# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago №2 Februaro, 2010


Kara Leganto! Kun granda plezuro ni prezentas al vi februaran numeron de nia monata bulteno, ĝi ja enhavas raporton pri la interesa prezentado de sia vojaĝo fare de s-ro Bruso. Evidentiĝis, ke li estas ne nur profesia opera kantisto kaj senlaca vojaĝanto, sed havas ankoraŭ unu interesan hobion-metion. Eble iam ni dediĉos al ĝi specialan kunsidon. Legonte programon por la februara kunveno (vidu sube), ne forgesu kunporti pecon de via ŝatata E-poezio.

La 21-an de Februaro estos Tago de gepatra lingvo, ni elkore salutas ĉiujn legantojn okaze de tiu festo kaj sciu, ke inter ni estas unu juna membro – Davido-Armano, por kiu E-o estas gepatra lingvo!


–La Redakcio

## Aûtovojaĝo Okcidenten




La 1-an de Septembro 2005 mi ekkomencis vojaĝi aŭte for de Ŝikago (vidu la mapon) al La Urbo de la Sala Lago, ŝtato de Utaho, kie mi havis longdaŭran amikon. Laŭ vojo mi vizitis diversajn usonajn vidindaĵojn. La tutan tagon mi trapasis tra la sovaĝa terpeco "Malbona Loko". Neniu ajn povas loĝi sur tia terpeco, sed ĝi prezentas belegan pejzaĝon, kion, mi esperas, vi povis vidi dank'al miaj fotoj. Malbona Loko situanta en la ŝtato Suda Dakoto, estas sekega kaj ne subtenas homan vivon. Ĝi egalas al proks. 990 km2 kaj estas Nacia parko. Rigardante for de la limo oni vidas ŝajne senfinan orkoloran herbejon. La sperto estis kortuŝa. La ĉirkaŭanta preriao subtenas tiel nomatajn "preriajn hundojn," kiuj loĝas are en vilaĝoj kies mezuro povas esti grandega.

Mi forlasis La Malbonan Lokon kaj iris al apuda Rapida Urbo, ankaŭ en ŝtato Suda Dakoto. Mi divenis, ke la nomo de la urbo rilatas al rapidfluejo laŭ Rapida Rivereto, kvankam mi ne vidis tion. Tie mi starigis mian tendon kaj restis dum kvar noktoj. Mi intencis viziti gravan nacian monumenton en Usono – Monton Ruŝmor. Tie skulptisto kreis la vizaĝojn de kvar prezidentoj: Vaŝington, Ĝeferson, Linkoln kaj Teodoro Ruzvelt(sur la foto). La alteco de ĉiu vizaĝo egalas proks. al 18 m.




Mi tiam aŭtomobilis laŭ Nadla Ŝoseo, kaj rigardante la fotojn, vi facile komprenos la kialon de la nomo. Tiuj-ĉi malaltaj montoj estas kovritaj per ĉiama verdaĵaro, kaj kiam oni vidas la montaron de distanco, ĝi aperas nigra, do, la regiono nomiĝas La Nigra Montaro. La aŭtobusoj devas rampi tra la malgrandaj tuneloj, ĉar la tuneloj vere estas nur kelkajn centimetrojn pli larĝaj, ol la aŭtobusoj!

Mi nun lasis Rapidan Urbon kaj veturis en la ŝtaton Vajomingo. Mi volis vidi tiean Nacian Monumenton, la unuan en Usono, kreitan de Teodoro Ruzevelt en 1906, kiam mia patrino havis du jarojn. La monumento nomiĝas "Turo de Diablo". Ĝi estas sankta al Indianaj popoloj, de kiuj la blankuloj forŝtelis ĉion, kio nun estas Usono.




Mi veturis tra Vajomingo, dormante unu nokton en hotelo, kaj la sekvan matenon atingante la domon de mia longtempa amiko. Ni konatiĝis en la jaro 1952, kiam ni soldatservis kune en Anglujo.

Mi restis kun mia amiko en La Sal-Laga Urbo ĝis la 27-an de Septembro. Kelkaj personoj sugestis, ke mi vizitu du naciajn parkojn, La Flavan Ŝtonon kaj La Grandan Mampinton (Cicon?). Mi klarigu "Grandan Mampinton". Iu franca esploristo, vidinte tiujn montojn, donis la franclingvan nomon Grand Teton, kaj tiu nomo restis. Usonanoj diras "grand teton" sen kompreni la signifon de la francaj vortoj, do, al usonanoj la vortoj ne portas la originalan signifon. Mi ektrovis, ke la du parkoj, La



Granda Mampinto kaj La Flava ŝtono, tuŝas unu la alian, do mi veturis de unu en la alian – subite. Ĉar la tempo estis malfrua, mi devis serĉi tranoktejon: en la montaro jam estis vintreme. Mi intencis tendumi, sed ĉiuj avertis min kontraŭ tio, ĉar ursoj minacas! La sekvan matenon mi reiris en "La Flava ŝtono"-parkon, kie mi rigardis multajn naturajn mirindaĵojn, kaj mi klopodis transporti mian ĝojon, mian miregon pri mia sperto. La parko enhavas kaldronaĵon de neaktiva vulkano, do, estas multaj termofontoj kaj aliaj indikoj pri vulkaneco. Vaporo fluas el tero laŭ la lagobordo. Estas kota kampo kun bolantaj basenoj, tra kiuj vaporo elfluas el tero. Bizonoj vagas libere kaj estas danĝeraj. Plej interesa al mi estis varmegaj fontoj. Strangaj, unuĉelaj plantoj kaj fungoj kreskas en la varmega, mineralplena akvo, sed rigardanto vidas nur kolorojn…

Finfine mi devis lasi La Flavan ŝtonon. Mia amiko havis kuzinon en Powell (urbeto oriente de la parko), kiu invitis min tranokti, kaj mi akceptis, kvankam mi neniam antaŭe renkontis ŝin. Mi tranoktis, trinkis kafon matene, kaj ekiris reen al Ŝikago... *–Bruso Stigers*

## Grave: INVITO

La Kolegio de Kompleksoj (College of Complexes), www.collegeofcomplexes.org – la libera parola forumo malferma al la publiko, invitas membroj de La Esperanto Societo de Ŝikago al la prelego pri E-o, kiu okazos sabate, la 27an de Februaro je la 8-11 ptm ĉe la Lincoln Restoracio, 4008 N Lincoln Ave, en Ĉikago, unu kvartalo de la haltejo "Irving Park" (Bruna Linio). La Lincoln Restoracio disponigas senpagan parkadon. Enirpago: $3.00, restoracio postulas ankaŭ aĉeton de la manĝaĵo kaj trinkaĵo. Bonvenon!

## E-Rotario Informas

Karaj kolegoj en Rotary, bv akcepti la lastan eldonon de la Fellowship Advancer en kiu aperas tre interesa demandaro pri lingvoj uzataj en la rotariaj kluboj en la tuta mondo. Tiu kontribuo de RADE estas la 5-a inter 15 raportoj sur pagho 6. La eldonisto akceptis ankaú chifoje nian tekston en Esperanto kaj en la Angla. Kiel vi povas legi en la editorialo, oni petas ke Vi, membroj, transdonu al viaj distriktaj kaj klubaj retadresoj la bultenon por ebligi al pli da rotarianoj la legadon kaj en nia kazo la respondon al la demandaro, kiu estos bazo por nia agado en Montreal. Ni petas al vi konfirmi la ricevon de chi tiu mesagho por kontrolo de la adresoj. *–Giuseppe Grattapaglia (distrikto 4530)*

## Adreso:


Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktoro Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org


## Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk
Vicprezidanto – D-ro Les Kordylewski
Eksprezidanto – Roberto Stalzer
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

## MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: $40 jare;
Familia membro: $30,
Regula: $20
Studento aŭ pensiulo: $10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn
828 S. Ada St,
Chicago IL 60607-4105

## KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

**Sulzer Regional Public Library**
**4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL**
**Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t. en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.**

## SEKVANTAJ KUNSIDOJ

23an de Februaro – Gregoro Dolgin estos nia ĉiĉerono en la mondo de Ampoezio (ĉiuj estas invitataj partopreni deklamadon de la ŝatata liriko)
23an de Marto – Andreo Kolganov kun temo "Skrib-sistemoj por la uzbeka lingvo: spertoj de la XX-a jarcento"
... 27an de Junio – Tradicia Pikniko